ĈEA-retkomunikoj 1/2005

ENHAVO:

1. Novaj konto kaj koresponda adreso de CxEA
2. CxEA kongresos en Vyškov
3. CxEJ denove fondota?
4. Parko de Milan Zvara - cxu kun lia statuo?
5. Ret-info nun senpage
6. Grupe al UK en Vilnon
7. Esperanto-arangxoj en Cxehxio
8. Sinpropono de franca preleganto

1. NOVAJ KONTO KAJ KORESPONDA ADRESO DE CxEA
Nova banko de nia asocio estas Poštovní spořitelna kaj nova konto estas: 195 230 825 / 0300. Vi povas pagi en cxiuj oficejoj de Poštovní banka kaj en posxtoficejoj, kie estas gicxeto de Poštovní spořitelna.
Por pagi (senpage) al la nova konto uzu la formularon VKLAD. En gxi estas nenie menciita via nomo kaj pro tio estas tre grava "variabilní symbol" (varia simbolo) - 10-cifera. Unuaj 5 ciferoj estas por numero de via asocia legitimilo kaj pliaj 5 ciferoj estas por la celo de via pago - konkreta simbolo (ekz. membreco - 06940). Pli detalajn informojn vi trovos en Starto 1/05, kiu baldaux atingos vin. Gxis tiam vi atendu. La konto en "Komerční banka" funkcios nur gxis 31. 3. 2005!!

Atentu, ke CxEA havas ankaux novan oficialan adreson: Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady II.

2. CxEA KONGRESOS EN VYŠKOV

Dum la tagoj 21-a gxis la 23-a de oktobro okazos la 11-a kongreso de Cxehxa Esperanto-Asocio en Vyškov.
En gxi estos elektita nova CxEA-komitato, kiu gvidos nian asocion venontajn 3 jarojn kaj krome dum la kongreso estos inauxgurita plia ZEO en Cxehxio: Pado Esperanto. Bv. noti bone la daton por povi partopreni! Pliaj informoj kaj aligxiloj: <Cea.polnicky@quick.cz>

3. CxU CxEJ DENOVE AKTIVA ?

Per komuna penado de tri studentoj (Marek Blahuš, Tomáš Břicháček kaj Dáša Chvátalová) revigligxas nuntempe CxEJ (Cxehxa Esperanto-Junularo). La celo estas restarigi klubon de cxehxa esperantista junularo, kiu unuigos lauxeble cxiujn junajn cxehxajn esperantistojn kaj interesigxantojn pri Esperanto, okazigos kursojn, organizos proprajn kunvenojn kaj komunajn veturadojn al eksterlandaj arangxoj, kolektos informojn pri Esperanto kaj ties uzo, helpos al homoj uzi Esperanton por korespondado, vojagxoj, amikeco ktp. La plej grava arangxo cxi-jara estas la 61-a IJK okazonta auxguste en Pollando, kiun oni intencas en kiel eble plej granda nombro partopreni. Bv. disvastigadi cxi tiun informon al cxiuj cxehxaj gejunuloj!

Interesigxantoj pri membreco en CxEJ (en la agxo gxis 29 jaroj) povas viziti provizoran retpagxaron cxe www.esperanto-cz.net kaj rekte aligxi cxe http://esperanto.blahus.cz/cxej/aligxilo.php

Bonan sxancon, niaj junaj samideanoj!!!

4. PARKO DE MILAN ZVARA - CxU KUN LIA MONUMENTO?

La urbo Poprad definitive konfirmis, ke la nun rekonstruata parko en la urbo portos la nomon de esperantisto Milan Zvara. Grupo de amikoj de Milan preparis proponon konstrui en la parko modestan monumenton de nia elstara samideano kaj amata amiko Milan. Lian aspekton vi povos vidi kaj en Esperantisto Slovaka, kaj en Starto (en venonta numero).
Malgraux kontribuo de la urbo mankas ankoraux suficxe alta sumo por la realigo de tiu plano. Cxar Milan havis ankaux multajn amikojn inter niaj membroj, ni petas tiujn, kiuj pretas helpi al la afero, bv. kontribui per unu el jenaj manieroj: a) per sendo de mono al Slovakio: nomo de la konto: Klub Poprančanov, 05801 Poprad, banko: OTP Banka Slovensko, č.ú.: 7317035/5200, IBAN: SK 12 5200 0000 0000 0731 7035, BIC (SWIFT): INRBSKBX, aux b) se vi havas monon cxe UEA, do eblas senkosta transgxiro al la konto cxe UEA: skmz-g.

5. RET-INFO IGxIS SENPAGA

La retposxta Esperanto-novajxservo "Ret-Info" igxis senpaga servo ekde januaro.

"Ret-Info" ne distribuas cxiujn mesagxojn, sed filtradas, selektadas inter ili, simile al redakcioj de paperaj E-gazetoj. Prioritatoj: novajxoj de la internacia E-movado, faka aplikado, novaj servoj, retejoj, ktp. Pliaj informoj pri la servo cxe: http://www.eventoj.hu .
Aligxo kaj malaligxo povas okazi en la supra retpagxo kaj ankaux cxe la adreso: "oficejo cxe eventoj.hu"

6. GRUPE AL UK EN VILNON

Asocio de Esperantistoj Handikapuloj organizas busan ekskurson al Universala Kongreso en Vilno. Forveturo el Pardubice estas vendrede la 22an de julio 2005 posttagmeze, alveno al Vilno sabate posttagmeze, traveturante Svitavy, Olomouc, Český Těšín, Varsovio, Bjalistoko. Logxadon oni supozas en du- aux trilitaj cxambroj de studenta hejmo laux la propono de UEA po 9,- aux 8,- Euxroj/nokto. Reveno al Pardubice dimancxe la 31-an de julio posttagmeze. Prezo de la ekskurso estas 5.000,- Kč. En la prezo estas ankaux 3 - 4 ekskursoj ekster Vilnon inkl. tuttagan ekskurson al Kauxnas. La prezo enhavas nek mangxadon, nek asekuron.

La kondicxo por povi partopreni la ekskurson estas pagita kongresa kotizo, kiun povas por vi peri la UK-peranto por Cxehxio, KAVA-PECH. Atentu, ke post la 31-a de marto la kongreskotizo altigxas senteble!

En la buso estas ankloraux kelkaj liberaj lokoj. Vian intereson cxeesti anoncu kiel eble plej frue al josef-hron@volny.cz, informojn pri la UK-kotizo vi ricevos cxe chrdle@kava-pech.cz.

7. ESPERANTO-EVENTOJ EN CxEHxIO:

20-a lingva seminario en Skokovy, 2005-04-11/17, inf.: drahotovaesperanto@seznam.cz

Adonido, 2005-04-15/17, Vracov: tradicia printempa turismado al herbejo kun multaj florantaj adonidoj finanta per amika kunesto en vinkelo. Inf.: melicharkova@quick.cz

E-renkontigxo en Litomyšl, 2005-04-23, Inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

IKUE-konfernco, 2005-05-13/15, Česká Třebová. Inf.: svacekm@quick.cz

E-renkontigxo en Šumperk, 2005-05-14, inf.: vgavandova@email.cz

Infana Tago, 2005-05-21, Svitavy. Inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

Ekspozicio pri Esperanto, 2005-05-16/27, Plzeň, inf.: Esperantoplzen@centrum.cz

Omagxo de 100jarigxo de EK Plzeň, 2005-05-20/22, inf.: Esperantoplzen@centrum.cz

TREP (Turisma Renkontigxo en Plasy), 2005-06-09/12, inf.: Esperantoplzen@centrum.cz

Esperanto-renkontigxo en Lanškroun, 2005-06-18: inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

Cxehxa-Pola-Slovaka supreniro al Czantoria, 2005-06-19, Inf.: suchanekj@seznam.cz

SET (Somera Esperanto-Tendaro en Lančov), la 1-a etapo 2005-07-03/16, la 2-a etapo 2005-07-17/30, la 3-a etapo 2005-07/31-08/13. Inf.: esperanto.trebic@volny.cz

UK-karavano al Vilno: 2005-07-22/31 Auxtobusa karavano por la partopreno de la Universala kongreso de Esperanto en Vilno. Vidu pli supre, Inf.: Josef-Hron@volny.cz

Renkontigxo de iamaj partoprenintoj de SET, 2005-08-13, Lančov. Inf.: esperanto.trebic@volny.cz

Ripozrestado en SAT (sen instruado): Lančov, 2005-08-14/27

IKUE-tendaro en Sebranice, 2005-08-06/13, inf.: svacekm@quick.cz

Renkontigxo en Polička, 2005-10-08, Inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

InPaSem 2005 (Internacia Paroliga Semajno), Dobřichovice, 2005-10-10/16, kurso por komencintoj (ne komencAntoj!) kaj seminario por jamaj parolantoj, 2005-10-10/16, inf.: chrdle@kava-pech.cz

8. SINPROPONO DE FRANCA PRELEGANTO
Venis sinprezento de s-ano Thierry Saladin, 50-jara direktoro de Asocio por la Sociala Integrigxo kaj por Esperanto. Li pretas fari prelegserion pri la temo: "Kion la esperantistoj devus fari hore de euxropa konstruo?" postulante nur gastigadon cxe iu esperantisto almenaux post la prelego. Kluboj, kiuj interesigxas pri tio, turnigxu rekte al: apsike1997@yahoo.fr.